

D-RO JAN STELLA-SAWICKI.*)

Je noktomezo.

En marto 1870 mi preparadis min al ekzameno el interna kaj ekstera patologio kaj el operacia ĥirurgio. La teoriar parton mi jam bone tralaboris, sed necese ankoraŭ estis referi pli gravajn operaciojn sur kadavro, por ke min ne trompu la parto praktika. Tamen la akiro de l'kadavro apartenis tiam al plej grandaj malfacilaĵoj, ĉar ĉiujn ilin forprenadis la militistmedicina lernejo; apenaŭ de tempo al tempo oni sukcesis ricevi por dissekcado iun manon aŭ piedon, sed eĉ ili jam estis multe de aliaj kripligitaj. Dum tiu embaraso venis al mi bona ideo min turni al gardisto de l'prosektorio, Jean, kaj donacinte al li kelkajn trankojn, akiri por tio la objekton, kiu tiumomente estis mia plej deziriga revaĵo.

Sinjoro — diris al mi la gardisto — mi nun havas nenion sub la mano, sed se vi konsentus ĉi tien veni je deka horo vespere, ni povus forpreni la reklamitan senvivulon, kiu nun kuŝas en la kapelo sur katafalko.

Oni nomis „reklamitaj“ tiujn, kiuj pagis en malsanulejo la kurackostojn kaj pro tio havis rajton ne esti sekcitaj post morto, se ĝin postulis iliaj parencoj.

La sciigo ĝojigis min senmezure: mi ekkuris domen por pretigi sekcajn instrumentojn kaj por trarigardi ankoraŭ operacian lernolibron, volante kiel eble plej malmulte da tempo perdi por legado kaj lasi ĝin plej multe por la operaciado, fine mi volis ĝuste reguligi la planon de tiu nova okupado.

Antaŭ naŭa horo mi estis jam en la loĝejo de l'gardisto, kiu ordiginte la prosektorion kaj atendinte, ĝis kiam ĉiuj foriris domen, donis al mi signon, ke mi lin sekvu en malsanulejan preĝejeton, kie estis ekspoziciitaj la mortintoj.

— Nun, diris Jean, helpu min sinjoro, por elpreni la senvivulon el ĉerko kaj lin senvestigi.

Post kelkaj minutoj la afero estis farita; mi forkaptis la kadavron en la brakojn kaj tra la malluma koridoreto mi ĝin kunportis en

prosektorion. Jean restis por fari ordigon en la preĝejeto.

Enportinte mian akiraĵon en la ĉambregon, mi ĝin kuŝigis sur la tablon, plej proksiman de l'enirpordo, mallevis la lampon kaj ĝin kovris per abajuro, por direkti lumon sur la kadavron kaj dismetinte la notaĵojn kaj ĥirurgiilojn, mi pretiĝadis komenci la laboron.

— Sinjoro, — diris al mi Jean, kiu ĵus eniris tiumomente — faru nur neniun operacion sur vizaĝo nek manoj, ĉar la parencoj povus ĝin rimarki kaj fari bruegon. Kiam vi finos la tranĉadon, volu min vekti; ni reportos la korpon en preĝejeton kaj vi min helpos por ĝin revesti.

— Bone — mi respondis — donu al mi la ŝlosilon, por ke mi povu ŝlosi la pordon de interne.

La prosektorio de l'medicina akademio estis ĉambrego, longa almenaŭ 16 metrojn kaj lumigita de ambaŭ flankoj per altaj kaj larĝaj fenestroj. Laŭlonge de la ĉambro staris duvice feraj sekcotabloj kaj sur ĉiu el ili kuŝis homaj restaĵoj almenaŭ de du kadavroj, diversmaniere ĉirkaŭtranĉitaj de la studentoj el militistmedicina lernejo. Laŭlonge de l'muro estis lokitaj akvokondukaj tuboj kun ĉanoj en alteco de la tabloj. Profunde kontraŭ la eniro la pordo kondukis al kolektejo de l'anatomiaj preparatoj, prilaboritaj de la lernantoj.

Ferminte la pordon de interne, por ke neniu havu ideon enrigardi kaj esplori, kio fariĝas en prosektorio, mi komencis la serion de l'operacioj per la ĉirkaŭligado de diversaj arterioj, poste sekvis la amputadoj kaj eksartikulacioj, eligado de ŝtonetoj el veziko kaj operacio de l'inkarceritaj hernioj.

Mi iamaniere tre bone sukcesis en ĉio, tiel ke mia laboro ĉirkaŭ noktomezo proksimiĝis jam al fino. Restis nur ripeti la operacion de distranĉo de l'traĥeo, kiun mi jam kelkfoje faris, la operacion de l'katarakto kaj de l'rektigo de l'strabo. Kliniĝinta super la kadavro, mi rigardis la tranĉdifektitan kor-

*) D-ro Jan Stella-Sawicki, estinta inspektoro de galiciaj hospitaloj, ludis gravan rolon dum pola insurekcio en 1863-4, kaj devigita ekziliĝi, studadis medicinon en Strasburgo, kie li dum la sieĝo organizis ambulancojn por vunditoj. La ĉi supra rakonteto estas do rememoraĵo je universitataj tempoj en Strasburgo.

La aŭtoro, en Polujo tre estimata, skribis multe da sciencaj kaj beletristikaj verkoj kaj interalie publikigis en „Głos Lekarzy“ (Voĉo de Kuracistoj) serion da felietonoj, el inter kiuj ni elprenas la supran rakontadon.

pon, la tranĉitajn muskolojn kaj nervojn kaj primeditis, kiom da tavoloj de mirindaĵoj arigis la kreinto en la korpo de ĉiu homo.

— Jen alvenis la horo de l' fantomoj — mi diris laŭte kaj fajfante kurbiĝis super la malvivulo, por elekti lokon, konvenan al ektranĉo. Sammomente aŭdiĝis en senluma salonprofundaĵo ia brueto, kiel se unu el la kadavroj, kuŝantaj sur malproksima tablo, estus moviĝinta. Kvankam mi al kutimiĝis al laboro inter senvivuloj, sciante, ke ili jam al neniu iun malbonon povas fari, tamen tiu brueto, nekomprenbla kaj mistera, aŭdiĝanta dum tomba mallaŭteco, faris malagraban impreson sur miajn nervojn. — Kio ĝi povus do esti? — mi diris al mi mem... He, senŝerĉaĵo! mi nur eraraŭdis kaj jen ĉio! — Kaj mi denove kliniĝis super mia okupaĵo.

Stranga estas tamen la homa naturo. Malgraŭ plej forta konvinko, ke la spiritmondo havas nenion komunan kun la teraj aferoj, malgraŭ la kono de l'natursciencoj, kiuj nin instruas pri l'analizo de fizikaj aferaĵoj, malgraŭ la spertiĝo, ke ĉiu materiaĵo devas havi sian materialan kaŭzon, — iu subita, malklara, aferaĵo inspiras al ni maltrankvilon kaj teruron.

— „Ne ekzistas multe da homoj en mondo“ — diris prave Napoleono — „kiuj estus kuraĝaj je dua horo nokte“. Tiu neatendita kaj mistera brueto tiom min maltrankviligis, ke mi ne povis kolekti pensojn kaj la mano, tenanta skalpelon, tremis.

Postmomente la brueto ripetiĝis. Mi ekaŭdis distinge en profundaĵo de la ĉambro ekŝovon de l'korpo sur fera tablo kaj ion similan al skrapado de l'ungoj sur lado. Tremo trakuris min de l'kapo al piedoj; mi rektiĝis kaj fiksas la okulojn en nigran spacon, kiun ne lumigis mia lampo. Ekregis nun mallaŭteco, sed nur por mallonge. La ŝovado kaj skrapado reaŭdiĝis, tiufoje dum pli longa tempo; poste mi aŭdis la bruon de l'kadavro, falanta sur ŝtonan plankon. Mi eksentis, ke la haroj starigis sur mia kapo... la sento de l'neeldirebla timo ekposedis tutan mian estaĵon, mi volis forkuri... Sed subite venis al mi la penso, ke ĝi povas esti iu homo, ekvekiĝinta el letargio, kiun oni ĉi tien estis alportinta, opiniante, ke li estas mortinto. Tiu penso min haltigis. Mi prenis en skuiĝantan manon la lampon kaj ekmarŝis en la profundon de la ĉambrego. Tuj kiam la eĥo de miaj paŝoj resonis de l'arkaĵo, mi denove ekaŭdis iun rapidan movadon — poste ĉio mallaŭtiĝis.

De unu el tabloj, starantaj profunde en

la ĉambrego, efektive malsuprenfalas unu kadavro kaj kuŝis, turnita per vizaĝo al tero. Blueta, kadavra koloro kovradis ĝian haŭton. Stariginte la lampon sur tablo, mi suprenturnis la vizaĝon de la kadavro. Ĝi estis sendube senvivulo, kiu jam servis por studoj al lernantoj. Bruston kaj ventron ĝi havis malfermitaj kaj la intestojn oni jam forigis. Ĝi do ne estis homo, alportita en letargio. Sed kio ĝin puŝis sur teron, estis por mi enigmo. Mi ekrigardis la tablon, pensante, ke ĝi donos al mi klarigon, sed ĝi havis, kiel la aliaj, deklivon al mezo kaj malfermaĵon por fluado de ĉiaj fluaĵoj en vazon, sube starigitan. Mi levis la kadavron kaj kuŝigis ĝin sur tablon.

Hodiaŭ mi jam ne povas ekanalizi la animstaton, en kiu mi troviĝis; mi rememoras nur, ke reveninte sur mian lokon, mi volis plue labori, sed la penso pri ĵus okazinta fakto ne permesis al mi rekolekti necesan atenton. Mi tralegis kelkajn paĝojn de miaj notaĵoj, sed konvinkiĝinte, ke ĝi estas vana laboro, ĉar nenio venas en la kapon, mi iris al Jean, por lin ekveki kaj kun lia helpo kunkudri la kadavron, reporti ĝin en la preĝejeton kaj vesti, kiel antaŭe, por ke neniu povu suspekti, en kia neatendita situacio sin trovis la malvivulo dum la nokto.

Pri la stranga akcidento tamen mi silentis antaŭ la gardisto, ĉar mi timis esti de li mokata.

Kiam ni enmetis jam la mortinton en la ĉerkon, mi kunprenis la librojn kaj sekciojn kaj adiaŭante la gardiston, mi lin demandis, kvazaŭ senintence:

— Diru, Jean, ĉu ofte ĉe vi okazas, ke la kadavroj malsuprenfalas nokte el sekco-tabloj, kiel ĝi hodiaŭ okazis?

— Ho, tre ofte, sinjoro. Dum nokto alvenas en prosektorion ratoj por manĝado kaj enirinte inter du korpoj, kuŝantaj sur la tablo, puŝegas ilin tiel forte, ke ĉi tiuj ruliĝas teren. Okazis iafaje, ke la ratoj formordadis nazojn kaj orelojn al la kadavroj. Ni faris diversajn eksperimentojn: ni ilin venenadis, starigadis kaptilojn, — nenio helpas; estos nepre alfari al ĉiuj tabloj ferajn piedojn, por ke la ratoj ne povu suprengrimpi.

Sciiginte, ke la kaŭzo de mia teruro estis tiel sensignifa, mi estis tre malkontenta de mi mem, tiom pli, ke mi sentis fortan nerveksiton pro tiu akcidento kaj perdon de bonhumoro. Mi nur konsoladis min per la proverbo: „errare humanum est“.

Trad. Helene Hempel.

Nasko, gravedeco kaj aborto ĉe la loĝantoj de la insulo Saĥalin.

Gilakoj.

Gilakoj konsideras la naskon kiel akto malpura, kiu neniel devas okazi en la jurto, ĉe hejma fajrujo. Tial ne nur somere, sed ankaŭ vintre kaj eĉ dum la plej akraj frostoj kaj ventegoj ili elkondukas la naskontinon en specialan, por ŝi preparitan kabanon proksime de la domo. Jam la loko, por tiu ĉi celo elektata, montras, ke Gilakoj la naskon tute malŝatas. La kabanon ili konstruas en la arbeto, destinita por virinoj kiel necesejo. Ĉi tiu arbeto estas ĉiam precize limigita kaj neniam iu viro al ĝi proksimiĝus. Eĉ al malgrandaj knaboj oni ne permesas tien iri, avertante, ke de la paŝado sur postsignoj de virina sango ili ricevos la „taremindon“ — t. e. specialan malsanon, devenantan de tia malpura virina sango kaj kaŭzantan paralizon de la manoj kaj piedoj.

La homo, suferanta tiun malsanon, ne povas sin movi, malgrasiĝas kaj mortas, ĉar taremindon estas nesaniĝebla.

Ili alkondukas la virinon ĉe unuaj naskaj doloroj en tiun kabanon, nomatan „lanraf“ (naskodomo). La kabanon mem ili faras rapide en la necesa momento. Kunstariĝita el stangoj, kovrita per malnova abia ŝelo, malalta, sternita per seka herbo, la kabanon similas pli la hundan budon, ol la ĉambron, destinitan por akcepti la novan loĝanton de l'mondo. La malproporcio, laŭ niaj komprenoj, inter bonaj sentoj kaj favoro por la novnaskito kaj kruda, kruela akcepto, al li montrata, en la okuloj de Gilakoj tute ne ekzistas. La infanon atendas ja spartana eduko, malsama ol la nia dorlotema, kaj poste malfacila, mizera, kruda vivo meze de ŝanĝema, sed ne mola nek milda naturo. Al neniu do el Gilakoj venos en la kapon la pripenso, ke por la nova malgrandeta gasto estus pli bona veno la unua renkonto kun homoj ĉe aliaj, pli oportunaj kondiĉoj.

La parturantino iras en la kabanon, metinte sur sin malnovan, malpuran vestaĵon. Se estas malvarme, ŝi prenas pli da vestoj. La tuta diferenco de la ordinara vestaĵo konsistas en tio, ke la parturantino demetas la

kalsonojn, kiujn la gilakaj virinoj portas vintre kaj somere

Al la naskanta preskaŭ ĉiam helpas maljuna aŭ mezaĝa sperta virino, kiu mem jam kelkan fojon estis naskinta. Se tia akuŝistino, nomata „lanaven ŝank“ ne estas proksime, tiam ŝin anstataŭas la edzo, sed en nenia kazo alia viro, eĉ ne la pli juna frato de la edzo, kiu laŭ gilakaj moroj posedas rajton al la edzino de pli maljuna frato kaj en ia grado sentas sin kiel edzo de lia edzino kaj ĉiam kiel dua patro de ŝiaj infanoj.

La virino naskas, sidante, ne etendante la piedojn. La sidejon oni aranĝas tiel same alta, kiel la tabullito en la jurto, t. e. je ĉirkaŭe duono da ulno. La naskantino devas dum la nasko resti kvieta, sin ne jetadi, ne provi leviĝi, ne kliniĝi en tiun aŭ alian flankon. Se la nasko estas malfacila kaj la virino mem ne povas sin teni en tia situacio kaj jetas sin de doloro, tiam la ĉeestanta akuŝistino, aŭ la edzo, ekkaptas la malsanulinon ĉe la ŝultroj kaj ne lasas fari tiajn malpermesitajn movojn. La virinoj, kiuj provas dum la nasko leviĝi, ricevas laŭ opinio de Gilakoj malsanon, konsistantan en kurbiĝo de l'vertebraro. Oni eĉ montris al mi tian, ankoraŭ junan, virinon, kiu de la nasko fariĝis malfeliĉa kriplulino. Ŝia vertebraro estis efektive kurbiĝinta, aŭ, kiel diras Gilakoj, rompita (naŝkicjonkrind“). Ŝi ne povis iradi kaj kelkajn jarojn post tiu malkvieta nasko ŝi mortis.

Se la naskaj doloroj tro longe daŭras kaj turmentas la malsanulinon, tiam oni ventumas sur la vizaĝon per basko de l'vesto aŭ blovas per buŝo de supre sur ŝian kapon, por akceli la naskon.

La infanon prenas la patrino kaj nur, se ŝi estas tro malforta, anstataŭas ŝin la akuŝistino.

Arte helpi ĉe la nasko Gilakoj tute ne komprenas kaj se la virino ne povas naski, ŝi mortas kaj kune kun ŝi la infano. Sed tiaj kazoj estas maloftaj. En la daŭro de dekkelkaj jaroj mi aŭdis nur pri unu tia kazo.

Gilakoj opinias, ke la unua nasko estas

ordinare plej malfacila, sed precipe ĝi estas malfacila kaj dolora ĉe tre juna, malsufiĉe disvolvita knabino.

Al virgulinaj, aŭskultantaj rakontojn pri naskoj, estas malpermesite ridi kaj oni postulas de ili, ke ili tiun akton tute serioze konsideru, ĉar alie povas al ili okazi en estonteco pli malfacilaj embarasoj kaj pli grandaj naskodoloroj, ol ordinare.

Por forigi kiel eble plej rapide la placenton, oni metas en la buŝon de la naskantino rabotaĵeron da sambuko (*sambucus racemosa*). Ĝia malagrabra amareco kaŭzas ĉe la naskantino vomojn. Gilakoj estas konvinkitaj, ke la vomoj helpas elĵeti la placenton (ehlan inind, t. e. en laŭvorta traduko „infana manĝaĵo“). Se tamen ĝi tro longe ne aperas, malgraŭ la dirita rimedo, tiam la virino mortas, kio kvankam malofte, tamen okazas ĉe Gilakinoj. La placenton, envolvitan en ĉifono, oni pendigas sur arbo en arbaro proksime de la domo.

Se la infano naskiĝis en „ĉemizo“ — tre rara fakto — oni ne forĵetas la fetusan membranon, sed singardeme ĝin sekigas kaj gardas kun granda zorgemeco inter hejmaj objektoj, ĉar ili kredas, ke tiu membrano, nomata „ehlan ok“ (infana vestaĵo) alportas feliĉon por la tuta familio.

La novnaskiton ili ne nomas en kutima maniero knabo aŭ knabino. Se naskiĝis infano de virina sekso, ili diras „mukin ehlan“ t. e. senvosta infano („mukind“ ili ordinare nomas hundon kun tre mallonga vosto) kaj pri knabo ili diras „moj ivend panend“ t. e. „penison havanta naskiĝis“.

Ili purigas per fingro al novnaskito la buŝon de muko kaj preskaŭ tuj almetas ĝin al la mamoj. La sekvontan tagon lavas ĝin la patrino per malvarmeta akvo, kiun ŝi ne elverŝas el vazo, sed el buŝo, mildigante tiamaniere iomete la malaltan temperaturon de tiu originala bano. Tiel same ili banas la infanon du fojojn tage dum plenaj du jaroj.

Se ĉe novkaskito iu membro estas anormala, neniu rektigas ĝin; ili ankaŭ ne konas la kutimon ebenigi la molan ŝvelaĵon sur kapeto de l'infano.

Post la nasko ili konsilas al junaj virinoj leviĝi kaj iradi, kontraŭe al pli maljunaj sidi. Sed antaŭ la nasko estas rekomendate fari kiel eble plej da movado sen diferenco pri la aĝo de la virino.

Dum dek tagoj antaŭ kaj post la nasko oni malpermesas trinki malvarman akvon. Se malestas teo, ili donas al la soifanta iom da varma akvo. Tiu sama dektaga tempo estas difinita por abstinenco de la fiŝoj kun ruĝa

viando (salmo), de ĉiaspeca sala manĝaĵo kaj nigra bero, kiu kreskas en tundro (empetrum nigrum). Antaŭ la nasko ili konsideras la brandon kiel malutila, sed post la nasko ĝi estas opiniata tre utila, kvankam ĝi malmulte estas uzata, ĉar entute Gilakoj kompare kun aliaj enlanduloj malofte uzadas brandon.

Naturaj abortoj („virund“) estas tre disvastigitaj ĉe Gilakoj, kiuj vidas en ili nenian danĝeron. Ili rakontis al mi, ke preskaŭ ne ekzistas virino, kiu ne travivus unu aŭ du abortojn. Tamen el tiuj, kun kiuj mi interparolis pri ĉi tiu temo, neniu aŭdis pri virino, kiu ĉiam abortadus kaj ne povus porti infanon ĝis la fino de 10 lunaj monatoj, kio estas ĉe ili la plej longa kaj ordinara templimo de l'gravedeco. Mi ne volas solvi la demandon pri kaŭzoj de oftaj abortoj ĉe Gilakoj, ne havante sufiĉe konvinkajn datojn kaj mi lasas tion al specialistoj-kuracistoj. Eble, ke Gilakoj apartenas al tiuj rasoj, kiuj havas inklinon al abortoj. Sed mi pensas, ke en tiu ĉi rilato multe influas superlaciĝo de l'virinoj per senĉesa, laciga laboro kaj kompleta manko de indulgeco por gravedaj virinoj. Oni tute ne malpliigas la troan hejman laboron de l'virinoj dum gravedeco kaj la edzo neniel indulgas la edzinon, portantan en sia seno infanon; tamen li poste tute trankvile kulpigas pri aborto diversajn malsagaĵajn kaŭzojn. Tiel Gilakoj estas konvinkitaj, ke aborto okazas, se infano ekbatos gravedan virinon sur vizaĝon per rimeno aŭ ia ajn longforma, ligna objekto, ekzemple per kulero, sago, ludilo, ligna tranĉilo, fiŝhoka tenilo k. t. p. Sed ne malutilas ekbatoj per branĉeto, aŭ freŝa bastoneto, detranĉita antaŭ nelonge de l'arbo aŭ arbeto. Forta kontuzo ĉe falo kaŭzas ankaŭ aborton.

Sian zorgemecon por la edzino esprimas la Gilako dum ŝiaj naskaj doloroj en tre originala maniero, solvante ĉion sur si: la plektitajn harligojn, la zonon, la rimenetojn de la ŝuoj, la surmanikojn. Oni devas ankaŭ ĉion solvi, kio dum tiu tempo aŭ en la domo aŭ ekster ĝi estus nodita aŭ alligita al io ajn. Tiel la Gilako elprenas tiam sur la korto la hakilon, se ĝi estas enhakita en ŝtipo. Li malligas la boaton, se ĝi estas alligita al arbo, elprenas ŝargaĵon el paŝilo, malstreĉas la sagojn en aŭtomata pafarko. La edzo vagas senzonigita, kvazaŭ malsana, de angulo al angulo, aŭ kuŝas, nenion farante, pripensante nur, kion ankoraŭ oni devas solvi kaj malstreĉi, ĉar doloroj de la edzino kaj longa daŭro de la nasko dependas de lia malatento kaj forgesemo en tiu rilato.

(*Daŭrigo sekvos*).

Trad. Regina Fels.